BELGIO NEDERLANDO GERMANIO

Senlime

**Groupe espérantiste de Verviers**

La Voĉo de Esperanto-grupo Verviersa

**Avec le soutien de la Fédération Wallonie-Bruxelles**

TRIMONATA INFORMILO PRI ESPERANTO EN LA VERVIERSA REGIONO

**En cas de non-distribution, merci de renvoyer à l'éditeur responsable:**
Jean-Marie **Jacques**,
5 rue Joseph Wauters
BE-4800 VERVIERS

**Informations en français**
**Informoj en la franca lingvo:**
Tel. +32-(0)87/33.02.92
Mail: jacques@senlime.org
Esperantista Grupo de Verviers
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters
BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands**
**Informoj en la nederlanda:**
Tel. xx-31-(0)43-455.14.36
Mail: parren@senlime.org
P.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch**
**Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@senlime.org
K. Hogen, Auf der Pief 22
DE-52134 HERZOGENRATH

**Aperas kvarfoje en jaro kaj rete elŝuteblas ĉe www.senlime.org**

**Prezoj por BE, NL kaj DE:**
**Unuopa n-ro : 4 EUR**
**Jara abono : 12 EUR**

Abono al **papera** versio de nia informilo (12 €) eblas sed **NE** en-havas la kotizon al ***Senlime*** (10 €).

Bonvolu pagi prefere jam en januaro **NUR** al la konto :
**BE41 9795 3271 4810**
BIC : ARSPBE22
(banque: Argenta) de ***Senlime***,
25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio

# ENHAVO :

**p. 1: Novaj film-surtekstoj de *Senlime*: Metropolis**
**p. 2: Niaj programeroj lupee**
**p. 3: Eŭregiona kalendaro 2017(-18 !)**
**p. 4: Verviersa angulo (*Unu bela tago en Roterdamo*)**
**p. 5: Zamenhof-festo en Bruselo**
**p. 6: Beneluksa kongreso en Houthalen («de Bosberg»).**

## Nova filmo surtekstigita en esperanto far' *Senlime*
## Nouveau film sous-titré en espéranto par *Senlime*:
## Metropolo – Metropolis (Fritz Lang).

***Metropolo*** estas germana filmo de la jaro 1927 reĝisorita de Fritz Lang kaj verkita de li kaj lia edzino Thea von Harbou pri romano ŝia el 1926. Ĝi estis la plej multekosta muta filmo de tiu tempo. La scenaro estas lokigita en estonteca urba malutopio kaj ekzamenas oftan sciencfikcian temon tiaman: la socia krizo inter laboristoj kaj riĉuloj en kapitalismo. Krome ĝi estas konsiderata mejloŝtono de la germana ekspresionismo en kino kaj unu el la plej elstaraj filmoj de la epoko de la muta kino. Oni eĉ povas diri, ke post Monopolo oni ne plu kreos filmojn kiel antaŭe.

La filmo estas videbla (en la franca) je http://youtu.be/hUhs1V_Dz7Y
La surtekstoj (rilatantaj al tiu versio de la filmo) estas elŝuteblaj je http://www.senlime.be/Kino/Metropolis.srt

**Métropolis** est un film allemand de l'année 1927 réalisé par Fritz Lang et dont le scénario a été écrit par lui et sa femme Thea von Harbou sur base d'un roman de celle-ci de 1926. C'était le film muet le plus cher de l'époque. Le scénario se situe dans une ville future non utopique et examine un problème de science-fiction fréquent à cette époque: la crise sociale entre les travailleurs et les riches dans le capitalisme. En outre, il est considéré comme une pierre angulaire de l'expressionnisme allemand au cinéma et l'un des films les plus importants du cinéma muet. Il est même possible de dire qu'après Métropolis on ne créera plus des films comme avant.

Le film est visible (en fançais) sur http://youtu.be/hUhs1V_Dz7Y
Les sous-titres (relatifs à cette version du film) sont disponibles sur http://www.senlime.be/Kino/Metropolis.srt

# Niaj programeroj lupee

***detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,…***

## Libertempo en Ibizo

**Ibizo** aŭ **Ejviso** (katalune *Eivissa*, hispane *Ibiza*) estas nomo de la tria plej granda insulo de Balearoj (post Majorko kaj Minorko). Ibiza havas surfacon de 572 km², la centro estas Ibizo-Urbo (*Eivissa Vila*). En Ibizo vivas ĉ. 82.000 loĝantoj daŭre, el kiuj ĉ. 6.500 oficiale anoncitaj eksterlandanoj.

La 3 plej gravaj komunumoj de Ibizo estas *Eivissa* (Ibizo-urbo), *Santa Eularia des Ríu* kaj *Sant Antoni de Portmany*, kiuj estas ankaŭ la ĉefhavenoj de la insulo.



Kune kun la sude situanta insulo Formentero (*Formen tera*) kaj multnombraj pli malgrandaj, neloĝataj rokaj insuloj, formas Ibizo la insularon Pitiusoj. Oficialaj lingvoj estas hispana (kastilia) kaj kataluna.

Ibizo estas montara kaj golfriĉa insulo. Ĝi situas ĉ. 90 km oriente de Hispanio. La plej alta pinto de Ibizo estas *Atalaya* (476 m super marnivelo).

Ibizo havas la plej ekvilibran klimaton de la Balearoj. La temperaturo somere estas ĉ. 30°C, vintre preskaŭ ĉiam super la frostopunkto.

**11-17** 20h00 Kelmis, Select: prelego de Eric Nemes: "Libertempo en Ibizo".
Inf. nemes@senlime.org

## Zamenhof-festo en Bruselo

La **Zamenhofa tago (15-an de decembro)** estas la naskiĝtago de L. Zamenhof (1859-1917), la iniciatinto de Esperanto, kaj la plej vaste celebrata festotago en la esperanto-kulturo. En tiu tago (aŭ en alia konvena semajntago ĉirkaŭ ĝi (ĉi-jare la 16-an de decembro), esperantistoj tra la mondo okazigas specialajn renkontiĝojn por festi la okazon.

La idearo de Esperanto kaj la proksimeco de la Zamenhofa tago al Kristnasko instigas la kunven-intojn interŝanĝadi donacojn (prefere librojn verkitajn en Esperanto) kaj bondezirojn. Foje okazas dum tiaj kunvenoj ankaŭ prelegoj pri L. L. Zamenhof aŭ alia temo. La Esperanto Civito registras la Zamenhofan tagon en sia konstitucio kiel la ***Tagon de la Esperanto-kulturo***. Pro tio ankaŭ muzikeroj programindas.

Kelkaj Esperanto-parolantoj pro-ponis celebradon de la 15-a de decembro anstataŭe kiel **Tago de Esperanto-literaturo** (aŭ **Tago de Esperanto-libro**, **Esperanto-Librotago**). Tial ili kuraĝigas Esperanto-organizojn kiuj okaz-igas renkontiĝojn dum tiu tago aldoni libro-recenzon aŭ poem-deklamadon en la programon, aŭ anonci publikigon de nova libro.

Aŭ, ĉe la nivelo de unuopulo, oni povas aĉeti libron aŭ komenci novan libron aŭ per simila taŭga maniero celebri la Esperanto-literaturon en tiu tago.

**12-16** de 11h30 ĝis 17h00, en K.C. De Piano-fabriek, Bruselo: *belga Zamenhof-festo 2017*.
Inf. nikolao147@gmail.com

## Roterdamo

Roterdamo (Rotterdam) estas la dua plej granda urbo en Nederlando (post Amsterdamo) kaj havas la plej gravan marhavenon de Eŭropo (la tria plej uzata en la mondo). La urbo situas en la provinco de suda Holando kaj havas ĉ. 600000 loĝantojn. Ĝi situas averaĝe du metrojn sub la mar-surfaco.

Krom Amsterdamo kaj Hago, Roterdamo estas unu el la kulturaj centroj de Nederlando. Ĝi disponas pri universitato, pluraj fakaj lernejoj, muzika altlernejo kaj art-akademio. Kompreneble troviĝas tie multaj muzeoj, inter kiuj la mondfama **Boijmans van Beuningen**.

Kiel industria kaj komerca urbo ghi estas gvida en Nederlando. Precipe impresa estas la Roterdama silueto de nubskrapuloj, kiu evoluis dum la pasintaj dudek jaroj.

Kiel industria kaj komerca urbo ĝi estas gvida en Nederlando. Precipe impresa estas la roterdama silueto de nubskrapuloj, kiu evoluis dum la pasintaj dudek jaroj.

Ekde la jaro 1955 en Roterdamo troviĝas la **Centra Oficejo de UEA**, kiu dufoje en la jaro (aprile kaj novembre) malfermas siajn pordojn (de la 10a ĝis la 17a horo) kaj sin prezentas tra diversaj aranĝoj (prelegoj,...).

**04-28** 7h00 Grupa foriro de Tilff al la centra oficejo de UEA en Roterdamo.
Inf. viviane.mesanges@gmail.com

# ESPERANTO✪

## Verviersa kalendaro 2017




***La grupo de Verviers*** publikigas ĉi-tie sian propran programon.

«***Trilandaj renkontiĝoj***» estu organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de ***Senlime***. Ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL)...

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de aliaj lokaj grupoj sed ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

**Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro**:

**Jean-Marie Jacques (jacques@senlime.org).**

**03-17** 20h00 Kelmis, Select: irlanda karaoke-vespero okaze de la festo de Sankta Patriko.
Inf. jacques@senlime.org

**04-21** 20h00 Kelmis, Select: sonregistrado de lecionoj el **Tinĉjo k. la templo de l'suno**.
Inf. jacques@senlime.org

**05-19** 20h00 Kelmis, Select: prelego de Didier Lousberg pri **ludoj en esperanto**.
Inf. lousberg@senlime.org

**06-16** 20h00 Kelmis, Select: vespero karaokea de ***Senlime***.
Inf. jacques@senlime.org

-

**09-15** 20h00 Kelmis, Select: sonregistrado de ĉ. 5 kaj 6 el *Tinĉjo kaj la templo de l'suno*.
Inf. jacques@senlime.org

**10-20** 20h00 Kelmis, Select: skrablo en esperanto (kunportu vian esperantistan ludon).
Inf. lousberg@senlime.org

**11-17** 20h00 Kelmis, Select: prelego de Eric Nemes: ***"Libertempo en Ibizo"***.
Inf. nemes@senlime.org

**12-16 11h30** Zamenhof-festo en Bruselo (De Piano).
Inf. nikolao147@gmail.com

**17-03** 20h00 Kelmis, Select: soirée-karaoké irlandaise à l'occasion de la St-Patrick.
Inf. jacques@senlime.org

**21-04** 20h00 Kelmis, Select: enregistrement de leçons de **Tintin et le temple du soleil**.
Inf. jacques@senlime.org

**19-05** 20h00 Kelmis, Select: conférence de Didier Lousberg sur des **jeux en espéranto**.
Inf. lousberg@senlime.org

**16-06** 20h00 Kelmis, Select: soirée karaoké de ***Senlime***.
Inf. jacques@senlime.org

-

**15-09** 20h00 Kelmis, Select: enregistrement des ch. 5 & 6 de *Tintin et le Temple du Soleil*.
Inf. jacques@senlime.org

**20-10** 20h00 Kelmis, Select: **scrabble en espéranto** (apportez votre jeu).
Inf. lousberg@senlime.org

**17-11** 20h00 Kelmis, Select: conférence d'Eric Nemes: ***"Vacances à Ibiza"***
Inf. nemes@senlime.org

**16-12 11h30** Fête Zamenhof à Bruxelles (De Piano).
Inf. nikolao147@gmail.com

# Verviersa Grupo

**Comité de V.E.G.:**

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEŬ)
Tél. 087/22.10.79
Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.20.30
Secrétaire: J.M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

**Ass. pour l'Espéranto (A.P.E.):**
www.esperanto-wallonie.be
Bernadette Poncelet, secrétaire
103 rue Windt
4850 PLOMBIERES
Tél. 087/39.85.70
bernadetteponcelet@skynet.be

## Cotisations

Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant chaque année leur(s) cotisation(s) au compte

**BE41 9795 3271 4810**
BIC : ARSPBE22
(banque: Argenta)

de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

*Ce bulletin d'information n'est plus intégré à la revue de APE «Espéranto en marche», qui a choisi de réduire sa taille...*

*La cotisation pour **EGV-Senlime** reste fixée à **10 Euros** (ou 22 Euros si vous voulez un abonnement à cette revue sur papier).*

**Indiquez les nom, prénoms et domicile du membre cotisant:**
***«cotisation de.... pour....»***

# Unu bela tago en Roterdamo

Okaze de la malferma tago de la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio (UEA), la esperantista grupo de Tilff (Belgio) **proponas** kunveturadon al Rotterdam per aŭtoĉaro Leonard, sabate, la **28an de aprilo 2018** por viziti la ĉefan centron de UEA. Neesperantistaj samfamilianoj rajtas partopreni. Detaloj sube. La prezo kompreneble dependos de la nombro da partoprenantoj.

**Provizora horaro:**

- foriro je la 7a horo ek de TILFF, placo de la reĝo Albert (kie estas parkolokoj por aŭtomobiloj)
- eventuala halto en ZAVENTEM (ĉefe por Bruselaj esperantistoj)
- alveno Nieuwe Binnenweg 176 ĉ. la 10a horo (komenca horo de la malferma tago)
- revena foriro ĉ. 15h45 por alveni en TILFF ĉ. 18H45.

La **Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA** (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando) okazas dufoje jare, sabate, kutime aprile kaj novembre. La tradicion komencis Osmo Buller en novembro 1994. En la programo troviĝas prelegoj kaj aliaj kontribuoj, kiel koncertoj aŭ prezentoj de libroj. La libroservisto kutimas doni (etan rabaton kaj) etan superrigardon pri la nove aperintaj libroj komence de la programo. Ofte oni havas ĉefgaston, per kiu oni varbas en la revuo Esperanto. Foje la aprilan Malferman Tagon oni kombinas kun la kunsido de la Estraro de UEA.

Por tiuj (principe, la ne-esperantistoj) kiuj deziras viziti (ĉiujn) muzeojn de Roterdamo, unu tago (aŭ eĉ une semajnfino) ne sufiĉas. Feliĉe, la plej famaj situas en (kaj en la ĉirkaŭo de) le Museumpark (malpli ol unu km for de la sidejo de UEA). La plej interesa el tiuj estas **Boijmans van Beuningen**, mondfama pro arta kolekto kaj prestiĝaj temaj ekspozicioj (enestas restoracio). Ankaŭ en la Museumpark: la tre severmorna Kunsthal de Rem Koolhaas kaj la Muzeo pri Naturaj Historioj. En tiu lasta, vi ne devas pagi la enirrajton por admiri la skeleton de kaĉaloto 15 metrojn longa, ĉar ĝi estas deekstere videbla en la vitra halo.

Ĉu iom da butikumado (por fini la viziton)? Se pluvos, la Westelijk Handelsterrein (sed ankoraŭ 500 m pli fore) estas bona elekto, kun 36 magazenoj sub tegmento.

Nepre revenu al la sidejo de UEA antaŭ la foriro de la aŭtoĉaro (kiu nenial kaj neniun atendos)!

**La prezo kompreneble dependos de la nombro da partoprenantoj. Se vi volas kuniĝi aŭ pli informiĝi, rapide skribu al Viviane Tits:** (viviane.mesanges@gmail.com).

Pour ceux (en principe, les non-espérantistes) qui veulent visiter (tous) les musées de Rotterdam, un jour (ou même un week-end) ne suffit pas. Heureusement, les plus célèbres sont situés dans et autour du Museumpark (à moins d'un km du siège d'UEA). Le musée le plus intéressant de la ville est Boijmans van Beuningen, avec une collection d'art mondialement célèbre et des prestigieuses expositions thématiques (il y a un restaurant).

Soyez revenu au siège d'UEA avant le départ de l'autocar, qui n'attendra personne, en aucun cas!

# Belgia ZAMENHOF-FESTO 2017 en BRUSELO (De Piano)

EBG, la Esperantista Klubo de Bruselo invitas vin partopreni sian Belgan Zamfeston kiu okazos sabaton la 16an de Decembro 2017 ek de la 11a30 en la Salono Zabriskie Point kiu situas ĉe la etaĝo —1 (atingebla per lifto) de la Kultur-Centro De Pianofabriek, Rue du Fort 35 - 1060 Bruselo je 250m for de la tramstacio *Parvis de Saint-Gilles/Sint-Gillisvoorplein*: tramoj 3, 4 kaj 51.

La ĉijara Zamfesto temos pri Potugalio, gastigonta lando de la venonta Universala Kongreso de Esperanto kiu okazos en Lisbono.

La klubo de Bruselo bonvenigos vin per portugala aperitivo kiu estos sekvata de bona portugala manĝo (supo, varmaj pladoj kaj deserto).

Poste ni havos distran programon kun interalie ampleksa Grupo de tradiciaj dancistoj, Ĥoro de Portugalaj kantistinoj, skeĉo, prelego pri la tre sukcesa somertendumejo de la Verdaj Skoltoj, tombolo, ktp…

Bonvolu prefere vesti vin kun koloroj rilataj al tiuj de Portugalio t.e. verdo-ruĝo aŭ tipe Portugalaj vestaĵoj.

Deelnamekosten voor de maaltijd Kotizo por la manĝo: 20 €

Bonvolu prefere ĝiri vian kotizon por la manĝo (20 EUR) al nia bankkonto :
IBAN: BE87 5230 8055 0794,
BIC: TRIOBEBB
De la: Esperantista Brusela Grupo

Se vi havas premio(j)n por la tombolo, bonvolu alporti ĝin/ilin.

Notu ankaŭ ke la "libroservo de FEL" kiel kutime ĉeestos. Do, se vi volas antaŭmendi aferojn kaj kolekti ilin en Bruselo, aŭ vidi libron?... Jen bona okazo!
Iru sur la retpaĝon
www.retbutiko.net
(aŭ sendu mesaĝon al butiko@fel.esperanto.be) kaj metu la volatan libron en la korbon. Skribu ĉe la fino de la mendo: "peto konsiderinda: ZAMFESTO".

BONVOLU ALIĜI PLEJ LASTE LA 9AN DE DECEMBRO 2017 ANTAŬ TAGMEZO sur jena paĝo:
http://goo.gl/forms/oVSHyggIpWEq09g23

Ni ja esperas vidi vin dum tiu ZAMFESTO. Ĝis baldaŭ!

La EBG-a teamo

\- - - - - - - -

EBG, le Club espérantiste de Bruxelles vous invite à participer à sa ZAM-FESTO belge qui aura lieu le samedi 16 décembre 2017 à partir de 11h30 en la Salle Zabriskie Point qui se trouve au sous-sol (accessible par ascenseur) du Centre Culturel De Pianofabriek, Rue du Fort 35, à 250 m de la station de pré-métro «Parvis de Saint-Gilles»: trams 3, 4 & 51.

Cette année la Fête Zamenhof aura pour thème le Portugal, pays hôte du prochain Congrès Mondial d'Espéranto, qui aura lieu à Lisbonne.

Le club de Bruxelles vous accueillera avec un apéritif portugais qui sera suivi d'un repas portugais (soupe, plats chauds et dessert).

Ensuite nous aurons un programme varié avec entre autres un imposant groupe de danseurs portugais traditionnels, un chœur de femmes portugaises, un sketch, une présentation du camp d'été très réussi des Verdaj Skoltoj, la tombola, etc …

Veuillez de préférence vous vêtir avec des couleurs en rapport à celles du drapeau portugais, vert-rouge ou avec une tenue typiquement portugaise.

Frais pour le repas: 20 €

Veuillez, de préférence, verser votre participation pour le repas à notre compte :
IBAN : BE87 5230 8055 0794,
BIC : TRIOBEBB
De : Esperantista Brusela Grupo

Si vous avez des lots pour la tombola, veuillez les apporter.

Notez en outre que comme d'habitude, le service "livre et musique" de FEL sera bien présent. Donc, si vous voulez faire une commande et en prendre livraison à Bruxelles, ou voir un livre ? Voilà une bonne occasion !
Allez sur la page:
www.retbutiko.net
(ou envoyez un courriel à butiko@fel.esperanto.be) et mettez le livre désiré dans le panier. Ecrivez en fin de commande: "Demande à considérer: ZAMFESTO".

VEUILLEZ VOUS INSCRIRE AU PLUS TARD LE 9 DÉCEMBRE 2017 AVANT MIDI sur la page:
http://goo.gl/forms/oVSHyggIpWEq09g23

Nous espérons bien vous voir lors de cette ZAMFESTO. A bientôt!

L'équipe de EBG

\- - - - - - - -

# La Beneluksa Kongreso

okazos en la Limburga loko "Houthalen"
de la 14-a de Septembro ĝis la 16-a de Septembro.

Ni kunvenos en bela arbara cirkaŭaĵo, ekster la urbo, en la centro "de Bosberg" ("la Arbarmonto).
La Beneluksa kongreso estas organizata de la loka grupo de Limburgo, LEA (Limburga Esperanto Asocio).
Rigardu la programon kaj enskribu vin rapide. Se la maksimuma nombro de partoprenantoj estas atingita, vi ne plu havos dormeblecon.
Certe ni havas tre interesan programon kun aktivaĵoj por ĉiuj.

Ni ofertas kursojn kaj ekskursojn, koncertojn kaj prelegojn, atelierojn kaj tiel plu. Ankaŭ sportumi eblas. Ni eĉ povas uzi la naĝejon.

Pli da informoj haveblaj ĉe LEA, la Limburga Esperanto Klubo.
email:limburg@esperanto.be - H. Schutters, tel. 011635592 ?

La plena programo estos publikigita poste:

Ni ofertas al vi:
- Kursojn en pluraj niveloj
- Prelegojn kun diversaj temoj
- Koncertojn de tre famaj muzikistoj
- Ekskursojn al Hasselt kaj al la merkato de Houthalen
- Atelierojn de diversaj artoj
- Eblecojn por sporti kaj promenadojn
- Diversajn vesperajn programojn

Ni asertas ke vi certe amuziĝos.

La prezoj de nia Beneluksa Kongreso estas plej malalta kiel eble.
Vi povas elekti laŭ deziro.

Se vi aliĝas antaŭ la 1-a de Marto la prezoj estas:

| Tutan kongreson | Vendrede | Sabate | Dimanĉe |
|---|---|---|---|
| 210 eŭroj | 40 eŭroj | 100 eŭroj | 80 eŭroj |

Ekde la 1-a de Marto la prezoj estos:

| Tutan kongreson | Vendrede | Sabate | Dimanĉe |
|---|---|---|---|
| 220 eŭroj | 50 eŭroj | 110 eŭroj | 90 eŭroj |

| | |
|---|---|
| Lui biciklon po tago: | 10 eŭroj<br>elektra biciklo: 25 eŭroj |
| Lui littukojn: | 15 eŭroj |

**!!! Personoj kiuj loĝas en Belgio, Nederlando kaj Luksemburgo kaj NE estas membro de la landa esperanto ligo pagos 10 eŭroj pli !!!**

Pagi prefere antaŭe sur la konto de LEA: (IBAN) BE19 7350 1901 4412 - (BIC) KREDBEBB

Nuligi vian enskribon nur eblas antaŭ la 15-a de Junio. Poste, ni ne povas redoni vian monon.